# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

PRIEURE SAINT - MARTIN
77610 LA HOUSSAYE EN BRIE
FRANCE

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★

(Association Catholique Française pour l'Espéranto)



Prezidanto: S-ro A. BESSIERE 28, rue C. Saint-Saëns 76000 ROUEN
Sekr: F-ino G. PREUX 55/3 Terrasse Rue du 11 novembre 59290 WASQUEHAL
Kasisto: S-ro G. VILLENEUVE 14, rue du Clair de Lune 91530 SAINT-CHERON
Religia konsilanto: P-ro L. BOURDON 7, av. Salomon 59800 LILLE
Peranto IKUE: S-ro M. COLLEU 95, rue Victor Hugo 80440 BOVES

C.C.P.: Association Catholique Française pour l' Esperanto 2 324 93 N ROUEN.



==== la n°: 8 F. Abono: 30 F. Kotizo: 10 F. Sume: 40 F. ====

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

==== N° 187 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====

*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== DECEMBRO 1995 ====

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

N.B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent nepre antaŭ la 5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx


## LE MOT DU PRESIDENT

Voici qu' une année s' achève et qu' une autre déjà germe avant de s' épanouir au cours des douze prochains mois. Cette nouvelle année sera faite d' événements dont le déroulement nous échappera en grande partie. Mais son évolution dépendra aussi pour beaucoup de choses de notre action et de notre volonté.

Aussi suis-je heureux de vous adresser mes voeux très sincères pour que 1996 soit pour vous tous une année pleine de joie, de santé et de progrès dans l' étude et la pratique de la langue universelle, source d' amitié et de compréhension entre les peuples.

Le mois de janvier 1996 sera déjà bien avancé lorsque nous aurons, comme à l' accoutumée, la semaine de l' Unité des Chrétiens. Aucun espérantiste catholique ne saurait rester à l' écart de ce temps fort qui rapproche les diverses confessions chrétiennes et crée entre elles des liens d' amitié et de tolérance mutuelles.

Ceux d' entre nous qui ont pris part, dans le passé, à nos rencontres oecuméniques avec nos frères protestants, savent par expérience combien il est enrichissant de vivre une semaine dans l' amitié et de se sentir frères dans le Christ, malgré nos divergences doctrinales et nos sensibilités différentes. Et, lorsque l' usage d' une seule et même langue commune à tous rend les échanges aisés et sans efforts, nous ne pouvons qu' apprécier le grand avantage de l' Esperanto et nous réjouir qu' il fonctionne si bien depuis plus de 100 ans, même si le grand public se refuse encore à en reconnaître la valeur et l' efficacité.

Ne nous lassons pas de montrer l' utilité de la langue universelle en la pratiquant lors de nos rencontres internationales.

A.B.

## LA BILETO DE LA PREZIDANTO

Jen finiĝas unu jaro kaj alia jam ĝermas antaŭ ol plene flori dum la dek du venontaj monatoj. Tiun novan jaron konsistigos eventoj, kies disvolviĝon ni grandparte ne komprenos. Sed ĝia evoluo dependos ankaŭ en multaj kazoj de nia agado kaj de nia volo. Tial mi ĝojas prezenti al vi miajn plej sincerajn bondezirojn por ke 1996 estu por vi ĉiuj jaro plena je ĝojo, sano kaj progreso en la studado kaj praktikado de la universala lingvo, fonto de amikeco kaj kompreno inter la popoloj.

La monato januaro 1996 estos jam preskaŭ finita, kiam ni havos la kutiman semajnon de la Unueco de la kristanoj. Neniu katolika esperantisto apartiĝu el tiu densa evento, kiu proksimigas la diversajn kristanajn konceptojn kaj kreas inter ili ligojn de inter-amikeco kaj -toleremo.

Tiuj el ni, kiuj foje partoprenis niajn ekumenajn renkontojn kun niaj protestantaj fratoj, spertis, kiom riĉige estas vivi unu semajnon en amikeco kaj sin senti fratoj en Kristo, malgraŭ niaj doktrinaj diverĝoj kaj niaj malsimilaj sentemoj. Kaj, kiam la uzado de unu sola kaj sama lingvo komuna al ĉiuj igas la interŝanĝojn facilaj kaj senpenaj, ni povas nur ŝati la grandan avantaĝon de Esperanto kaj ĝoji, ĉar ĝi tiel bone funkcias de pli ol 100 jaroj, eĉ se la vasta publiko ankoraŭ ne agnoskis ĝiajn valoron kaj utilecon.

Ni senlace montru la utilecon de la universala lingvo, ĝin praktikante dum niaj internaciaj renkontoj.

A.B.

N.D.L.R. Ni praktiku ĝin en <u>ĉiuj</u> renkontoj inter esperantistoj.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## HISTORIO DE LA KRISTNASKA FESTO

La unuaj kristanoj deziris honori la naskiĝdaton de Kristo. Kvankam oni ne precize scias en kiu tago li naskiĝis, oni elektis la 25-an de decembro kaj en la jaro 354 la kristanaro en Eŭropo festis Kristnaskon por la unua fojo. Poste en la jaro 400, en la itala urbo Nola, la sonoriloj bonvenigis la naskiĝon de Kristo je noktomezo, alvokante la urbanaron en la preĝejon.

Kvar jarcentojn poste, la Majenca Sinodo, en 813, ordonis la enkondukon de Kristnasko por la tuta eklezio kaj iom post iom la festo iĝis tre populara.

En 1223, S-ta Franciska starigis la unuan kripon kun statuoj de la kristnaska historio. Tiu kutimo disvastiĝis en la tuta eklezio kaj restis tre forta, ĉefe en la sudaj landoj.

En la nordaj landoj, oni ankaŭ prenas, en 1640, la kutimon ornami la kristnaskan arbon kaj unu jarcenton poste, en 1750, oni komencas, ĉefe en Germanujo, starigi la unuajn kristnaskajn bazarojn.

Kristnasko tamen restas tre populara. La famkonata kanto "Paca nokt', sankta nokt'" estas verkita en 1818 de J. Mohr kaj Fr. Gruber. Fine, okaze de la unua mondmilito, la usonaj militistoj enkondukas la legendon de Sankta Klaus, nomita Patro Kristnasko en Francujo.

Laŭ raporto de B.A.I. Ruigrok el Nederlando

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## EKUMENA DISERVO DUM LA 2-a EUROPA KONGRESO

Okaze de la 2-a eŭropa kongreso en Paris, nia asocio organizis, kun la helpo de la francaj KELI-anoj, ekumenan diservon en la Pentekosta dimanĉo.

Pli ol 80 personoj partoprenis la diservon en la pariza preĝejo S-ta Petro de Montrouge, kiun la paroĥestro afable disponigis al ni.

Post komuna liturgio de la parolo, S-ro Philippe Cousson, KELI-ano, predikis. Poste P-ro Héroux celebris la Eŭkaristion laŭ la katolika rito.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## NIA MEMBRARO

Novaj anoj 1995: 10, 11. G-roj BASSO (H-Rhin); 12. S-ino LAURENT (Jura); 13. S-ro DION (Morbihan). Koran bonvenon al ili!

Bonfarantoj 1996: 1. S-ro BESSIERE (S-M). Dankegon al li pro lia grava helpo.

## PREĜO DE PATRO DE FOUCAULD

Patro mia, mi fordonas min al vi,
Faru el mi, kio plaĉos al vi.

Kion ajn vi faros al mi, mi dankas vin.
Je ĉio mi pretas, ĉion mi akceptas.

Nur via volo-fariĝu en mi,
en ĉiuj viaj kreitaĵoj,
nenion plian mi deziras, Dio mia.

Mi fordonas mian animon inter viajn manojn.
Mi donas ĝin al vi, Dio mia,
kun la tuta amo de mia koro,

ĉar mi amas vin,
kaj ĉar por mi estas ambezono min fordoni,
min meti inter viajn manojn senlime,
kun plena fido,

ĉar vi estas mia Patro.

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

## LA KRISTANA ORIENTO (daŭrigo)

Tie do, en Panagia Kapulu, la Virgulino Maria finis sian teran vivon. Konvinkite pri tio, S-ro Jung revenas en Efeson.

- "Ŝerculo"! diras al li S-ro Poulin.

Tiu ironia akcepto ne malhelpis, ke la superulo mem iris surloken ekde la 12-a de aŭgusto kaj tien reiris la 19-an, kun grupo da specialistoj.

La nova ekspedicio restis surloke preskaŭ unu semajnon kaj komunikis siajn konkludojn al la ĉefepiskopo de Smirno, M-ro Timoni, kiu rajtis decidi ĉu daŭrigi la esploradon aŭ ne. La prelato opiniis, ke oni devas daŭrigi kaj kreis komisionon de spertuloj, kiun li prezidis.

La 1-an de decembro 1892, M-ro Timoni kaj la komisiitoj iris sur la lokon, kie oni konstatis, ke la priskriboj de la viziulino estas konformaj kun la realo. Tiun konstaton oni protokolis. Dume, F-tino de Mandat Grancey akiris la bienon Panagia Kapulu, t.e. 140 hektaroj, por 31 000 or-frankoj, pagitaj dank' al la helpo de ŝia patro.

Tre malfacila estis tiu vendo: hezitado de la vendisto, la "bejo de Arvaŝa" maljuna xx avarulo kaj riĉa eminentulo, supermezuraj hakŝiŝoj enkasigitaj de ĉiu ŝtupo de la administra kaj juĝa aŭtoritatoj, fine kaj ĉefe malamikaj reagoj de la muzulmanoj forĵetantaj la principon mem de tiu biena aĉeto fare de kristanoj en islama lando.

Restis ankoraŭ dubo: la konstrudato de la "domo". Famaj arkeologoj kaj arkitektoj venintaj el ĉiuj horizontoj malaperigis ĝin datante je la unua jarcento la konstruadon de granda parto de la domo (1).

(daŭrigota)

(1) Tio estas la aserto de pluraj anoj de la Atena franca lernejo venintaj al Panagia Kapulu ekde 1892, opinio dividita de S-ro Hogart, profesoro en Oxford, estro de la esploroj de la templo de Artemis en Efeso, kaj de Profesoro Prandi, kiu estris la esplorojn de Panagia Kapulu en 1967.

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

## LIBRO PRI NIA MAJSTRO

Ĵus aperis franclingva libro de René Centassi kaj Henri Masson: "L' homme qui a défié Babel, le père de l' Esperanto" ĉe la eldonejo Ramsay.

Tiu 400-paĝa verko priskribas la vivon de D-ro Zamenhof.

En sia numero de la 8-a de septembro 1995, la revuo "Le Pèlerin" aperigis 4-paĝan artikolon tre favoran pri tiu libro.

Nia prezidanto tuj skribis al la revuo por ĝin gratuli kaj konigi la agadon de IKUE kaj FKEA, aldonante taŭgajn dokumentojn. La ĉefredaktoro afable dankis kaj substrekis, ke Le Pèlerin opiniis utile konigi la vivon de Zamenhof.

. . . . .

PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNVENO DE LA 18-a DE OKTOBRO 1995

Ĉeestis: F-to Marmou, S-ino Vincent, S-roj Bessière, Colas, Colleu, Despiney, Lafargue, Pons kaj Villeneuve.
Petis senkulpigon: P-ro Bourdon kaj F-ino Preux.

La komitato dankis S-ron Pons pro la sukcesa kaj bone organizita kongreso en Limoges; ĝi decidis, ke la venonta ĝenerala kunveno de la asocio okazos en Paris dimanĉon, la 12-an de majo 1996. En tiu kunveno, oni renovigos unu trionon de la komitato. Tri (3) postenoj vakas.

KANDIDATOJ SIN ANONCU ĈE LA PREZIDANTO.

Nia venonta kongreso okazos nur en 1997 en La Houssaye-en-Brie, de la 23-a ĝis la 27-a de majo. F-to Marmou prizorgos la organizadon en konvena tempo.
S-ro Pons raportis pri la IKUE-kongreso en Olomouc (Ĉekio) kaj pri tiu de la italaj katolikoj en Grottamare. Li ankaŭ informis pri projektita eldono en Esperanto de la libro "Dio parolas al siaj infanoj".
La venonta komitatkunveno okazos en Paris la 24-an de januaro 1996.
Observantoj bonvenaj.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

KIEL HODIAŬ PORTI LA EVANGELION AL EŬROPO KAJ LA MONDO?

Estimataj kaj tre karaj gefratoj en Jesuo Kristo!

Moto de ĉi tiu nia ekumena kongreso estas la demando:Kiel hodiaŭ porti la Evangelion al Eŭropo kaj la mondo? Respondo je ĉi tiu demando estas simpla kaj mallonga. Ni devas komenci unue ĉe ni mem. Ni devas unue porti la Evangelion al ni mem, permesi al ĝi enpenetri ĉiun spacon de nia vivo, la tutan korpon kaj animon, por ke ni iĝu lumo, se ni volas sukcesi en la evangelizado de Eŭropo kaj la mondo. Ankaŭ al ni estas adresitaj la vortoj de Jesuo Kristo:"Pentu, konvertu vin kaj kredu en la Evangelio": Se ĉiu el ni akceptos ĉi alvokon de Jesuo kaj se ni praktikados ĝin en la vivo, ni iĝos misiistoj pretaj konkeri Eŭropon kaj la mondon por Kristo. La alvoko:"Pentu, konvertu vin" estas por ni ĉefa tasko, se ni volas, ke Eŭropo kaj la tuta mondo konvertiĝu. La dua parto de la alvoko diras: "kredu en la Evangelio". Karaj gefratoj, ĉu neniam aperas ĉe ni duboj, ĉu la Evangelio estas aŭtenta, vera vorto de Dio? Ĉu ni ofte kaj volonte legas kaj primeditas la ĝojan mesaĝon de Jesuo aŭ ĉu ni preferas legaĵojn, kiujn subŝovas al ni la malamiko - la diablo por forlogi nin de Kristo, por irigi nin ne laŭ mallarĝa vojo al la ĉielo, sed laŭ larĝega vojego al eterna pereo? Jes, karaj gefratoj, komence ni esploru la konsciencon; ĉu ni vere indas esti nomataj kristanoj, disĉiploj de Kristo, kiuj kapablas porti la Evangelion al Eŭropo kaj al la mondo. "Kristano", jen la titolo superanta ĉiujn titolojn de la mondo. Sed ĝi ankoraŭ ne sufiĉas por nia eniro en la regnon de Dio. Ni devas prefere ami Dion kaj la proksimulojn, kredi kaj fidi plenkore en Jesuo Kristo kaj plene vivi laŭ la Evangelio. Tiam validos por ni la vortoj de Jesuo:"Vi estas la salo de la tero, vi estas la lumo de la mondo". Jes, se ni vivos aŭtentan vivon laŭ la Evangelio, per tio ni aŭtomate evangelizos en niaj medioj, en kiuj ni vivas. Ni, kongresanoj venas el diversaj lokoj de Eŭropo kaj la mondo. Evangelizante en niaj loĝlokoj, ni komune plenumos la moton de la kongreso, ĉu ne?

Karaj gefratoj! Dum la lastaj jaroj de la totalisma sistemo, vekis atenton en nia lando fortiĝanta intereso pri religio. La eklezio, ĉefe pro la brava sinteno de kardinalo Tomášek kaj ceteraj bravaj pastroj kaj laikuloj, vekis intereson ĉefe ĉe junaj homoj. Tiam ni vivis kun espero, ke post falo de la fera kurteno pleniĝos preĝejoj, ĉar ne plu ekzistos religia persekutado. Sed baldaŭ post ĉi tiuj gravaj eventoj, kiuj fakte forigis la feran kurtenon kaj barilojn inter la ŝtatoj, ni kun bedaŭro konstatas, ke 40-jara religia persekutado en nia lando rikoltas siajn fruktojn ankaŭ en la nuna, postrevolucia tempo. Novaj vivkondiĉoj, transformo de la tiel nomata socialisma sistemo je kapitalisma kaj diversaj malbonaj influoj forlogis ankaŭ multajn, ĉe kiuj la kredo ludis nur epiteman rolon kontraŭ la totalismo, sed mankis profunde en la koro. Ni kun bedaŭro konstatas, ke la preĝejoj ankoraŭ pli malpleniĝis. Tiu ĉi fenomeno estas rimarkebla ĉefe en negrandaj urboj kaj vilaĝoj. Kontraŭeklezia sinteno de potenculoj ludas tiurilate ankaŭ malbonan rolon, kreante kontraŭeklezian atmosferon. Oni povas ŝajne kons-

../...

tati, ke la diablo triumfas ne nur en nia lando kaj pluraj postkomunismaj landoj, sed ankaŭ en la ceteraj landoj de Eŭropo kaj de la mondo; kie envenis praktika materialismo kun sia konsumismo. Eŭropo kaj la tuta mondo iĝis grandega tereno por misia laboro, por evangelizado. Progresanta apostato pelas la mondon renkonte al apokalipsaj kataklismoj. Forpelo de Dio el la homaj koroj kaŭzas estingon de la amo ne nur al Dio, sed ĝenerale al ĉiu kaj ĉio. Kie ne estas amo, tie regas malamo, malpaco, malfeliĉo, ĥaoso. Sen Dio la homaj koroj restas malplenaj, malkvietaj kaj malfeliĉaj. Materialismaj ideologioj ne donis internan feliĉon al la homoj. Pro tio la koroj de tiom da homoj ĉie en la mondo soifas pri io, kio redonus al ili feliĉon, senton de pleneco. La tereno por dissemi la Ĝojan Mesaĝon estas preparita. Ĉu ni uzos la situacion kaj plenigos la serĉantajn kaj soifantajn homajn korojn per la Evangelio de Jesuo Kristo? Aŭ ĉu ni pro indiferento kaj tro komfortemo permesos, ke iliajn korojn konkeros la diablo semante en ilin diversajn falsajn ideojn, ideologiojn aŭ misformitan kredon de diversaj strangaj sektoj, kiuj aperis en la mondo, do ankaŭ ĉe ni kiel "fungoj post la pluvo"? Kion ni faru? Ni ĉefe ne seniluziiĝu pro la ŝajna venko de Satano en la mondo. Jes, lia sukceso en konkerado de la homaj animoj estas nun granda, sed rapide proksimiĝas lia grandega falo.

Karaj gefratoj! En la preĝo de la Sinjoro ni preĝas:"Venu via regno". Regno de Dio sur la mondo, dua alveno de Jesuo estas jam antaŭ la pordo. Ĉu ni estas preparitaj je Lia alveno? Okazas en spirita sfero grandega batalo inter bono kaj malbono. Kaj ni firme kredu, ke la venko de bono estas jam proksima. Sed ni ne nur kredu, ni ankaŭ agu, por ke la puriga tempo de la homaro rapide pasu, por ke la tempo de la fina venko, la alveno de la dia regno okazu laŭeble plej baldaŭ. Ni portu la Evangelion al Eŭropo kaj la mondo. Tio estu programo de ĉiu kristana esperantisto en la mondo. Ni, ĉeĥaj katolikaj esperantistoj, per nia agad programo praktike plenumas ĉi tiun programon celante spiritan kaj moralan renoviĝon de la socio. Dum la antaŭlasta ekumena kongreso en Velence en Hungarujo, mi parolis pri nia aktivado dum la totalismo, ĉefe pri evangelizado per naŭ IKUE-tendaroj, likviditaj de la ŝtata polico en 1977, sed kiuj dum longaj jaroj donadis bonajn fruktojn. Unu semajnon post ĉi tiu kongreso komenciĝos nia 13-a IKUE-tendaro. Ĝin partoprenos ĉefe junaj homoj, kiuj sopiras trovi plej valoran perlon - la kredon, aŭ volas plifortigi sian kredon kaj spiritan formadon por porti la Evangelion al la juna generacio en diversaj anguloj de la lando. Kaj kiel estontaj aktivaj esperantistoj ili povos helpe de Esperanto porti la Evangelion al la ceteraj esperantistoj de Eŭropo kaj la mondo, kiuj ankoraŭ estas survoje serĉante la perlon. Parto de esperdona junularo de nia sekcio estas ĉi tie inter ni.

Karaj gefratoj! Tiu ĉi praktika evangelizado ne estas facila. Estas necesa konstanta batalo kontraŭ la malbonulon, kiu metas antaŭ niajn piedojn diversajn obstaklojn por sufoki nian aktivadon. Sed nin ne timigas la obstakloj. Ni havas pli potencajn ĉielajn helpantojn, nian bonan ĉielan Paĉjon, Lian Filon Jesuon Kriston kaj la potencan Sanktan Spiriton. Krome ni havas nian ĉielan Panjon, Virgulinon Marian, Ŝian Senmakulan Koron, al kiu estis konsekrita pasintjare ne nur nia tuta ĉeĥa popolo, sed ankaŭ nia IKUE-sekcio kaj la tendaro. Ni esperas, ke la konsekron de la tendaro renovigos nia patrono, episkopo K. Otčenášek, kaj la konsekron de la IKUE-sekcio renovigos ĉefepiskopo kaj primaso de Prago Miloslav Vlk la Pere de Maria, sub Ŝia gvido, ni volas iri la plej sekuran vojon renkonte al Kristo. Pro tio ni ĝoje venis aŭ revenis ĉi tien, kie Ŝi estas honorata kiel Sanktmonta Rozo Spirita kaj de la pola popolo honorata kiel Reĝino de Pollando. Ŝi volas savi la nunan mondon antaŭ ĝia memperejigo; ŝi memorigas al ni la evangeliajn postulojn de Jesuo: kredon, esperon, amon, fidon, penton, preĝon, oferon, ktp. Ŝi frakasos la kapon de la diablo.

Konklude mi volas alvoki vin, karaj gefratoj. Kiam ni preĝos la preĝon de la Sinjoro, konscie, koncentriĝe kaj sopire, ni diru:"Venu via regno". La regno de Dio, erao de la Sankta Spirito, kiu transformos tiun ĉi valon de larmoj en regnon de amo jam malfermas la pordon de la mondo. Jesuo revenas; ĉu niaj lampoj estas pretaj, ĉu ili brulas kaj havas sufiĉan provizon da oleo? Estas bone, se renkontas sin en amo gefratoj, kristanoj de diversaj konfesioj, por komune preĝi pri unuiĝo de la kristanoj, por ke denove estu unu grego kaj unu paŝtisto, por ke la disŝirita Mistika Korpo de Jesuo ekbrilu en sia denova tuteco. Ni ne tro diskutu, sed ni prefere komune preĝu, preĝu, preĝu...

Prelego de Miloslav Šváček, dum la 10-a ekumena
Esperanto-kongreso en Gostyn, Pollando, julio 1994

## NEKROLOGO

Ni priploras la forpason de du el niaj fidelaj membroj:

1. Pastro Gérard SCHNEIDER, paroĥestro en St-Clément (Yonne), dumviva membro. Li modele organizis nian kongreson en Sens, kaj dum jaroj instruis Esperanton al siaj messervantoj.
2. S-ro Raymond PONS, tre agema en sia departemento Ariège, kie li redaktis kaj eldonis dum longa tempo "Esperanto-Pyrénées".

Ni kore kondolencas al iliaj familioj kaj preĝas por la ripozo de iliaj animoj.

IKUE-membroj 1995: 29. S-ro CHEVALIER; 30. S-ino KLEIN
1996: 1. S-ro COLLEU; 2. S-ro SAUTREUIL.

KASISTA AVERTO: mi ankoraŭ atendas la kotizon 1995 de: MJP (49), JS (63), JV(35)
Sen pago vi ne plu ricevos nian bultenon.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## KOTIZTABELO 1996

I.K.U.E. kun "Espero Katolika" 140 F
Peranto: S-ro M. COLLEU p.ĉ.k. LILLE 10 621 81 P.

----------

A.C.F.E. kun "Franca Katolika Esperantisto" - unuopulo 40 F
geedza paro 50 F
infano ĝis 16-jara, pastro, religiul(in)o 20 F
bonfaranto 200 F

----------

U.F.E. kun "Revue Française" kaj "E° Actualités" 280 F

U.E.A. kun "Esperanto" kaj Jarlibro 300 F

Association Catholique Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## ENHAVO

1. Le mot du président
2. La bileto de la prezidanto
Historio de la Kristnaska festo
Ekumena diservo en Paris
3. Preĝo de Patro de Foucauld
La kristana Oriento
4. Protokolo de la komitatkunveno
Kiel hodiaŭ porti la Evangelion
5. al Eŭropo kaj la mondo?
6. Nekrologo

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

Dépôt légal: 4ème trimestre 1995 !! Polycopié par l' A.C.F.E.(enregistrée le 6
!! mai 1977 à la sous-préfecture de Saumur sous
C.P.P.A.P. n° 62 532. !! le n° 2 523 bis, J.O. 23/05/1977)
Directeur: Albert BESSIERE !! au Prieuré St-Martin
Directeur-délégué: !! 77610 LA HOUSSAYE EN BRIE
René-Jean MARMOU !! FRANCE

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

Lastminutan informon : La ĝenerala kunveno en la Konvento S-ta Jakobo, ĉe la Dominikanoj, rue des Tannières, Paris 13 (metro : Glacière) la dimanĉon 5-an de majo 199